Pola Esperanto-Asocio

filio Gliwice

# Kroniko

**Jaro 2008**

La 20-an de februaro 2008 jaro ni decidis fondi la propran retpaĝon.








**La 20-an de februaro 2008 jaro** prezidanto de nia filio Stanisław Mandrak prezentis al ni lernolibron "Esperanto por rekta metodo". Aŭtoro de ĉi tiu lernolibro kaj ĝia slovaka versio estas konata, slovaka esperantisto Stano Marĉek. La lernolibro konsistas el 22 lecionojn kaj por lernado oni povas uzi la novajn, teknikajn, multmediajn rimedojn (diskoj CD). La lernolibro jam aperis en kelkej lingvaj versioj. La aŭtoro de pola versio estas Stanisław Mandrak, kiu ekde kelkaj monatoj uzas ĝin dum lernado de studentoj de Universitato de Tria Aĝo.
La lernolibro kaŭzis grandan intereson de ĉeestantoj.

**La 26-an de februaro 2008 jaro** en faka lernejo en Knurów Aleksander Zdechlik kaj Stanisław Mandrak aranĝis kunvenon kun leranatoj. Ili prelegis pri "Vojaĝoj kun Esperanto". La prelego tre interesigis junajn homojn.



# Ni rememoras la kreinton de Esperanto

**La 27-an de februaro 2008 jaro** Krystyna Grochocka montris la multmedian prezentadon pri la vivo kaj laboro de Ludoviko Zamenhof. Post la fino de prezentado, ni diskutis pri ĝi kaj kune korektis lingvajn erarojn. Dank' al kunveno ni rememoris kaj disvastigis la sciencon pri kreinto de Esperanto. Ĝi estis ankaŭ bona leciono pri la lingvo.




Urba Publika Biblioteko en Gliwice kaj Pola Esperanto Asocio - Filio Gliwice invitas al ekspozicio Esperanto - **akiraĵo de pola kulturo**




En la ekspozicio, oni prezentos esperantaĵojn el kolektoj de membroj de Filio PEA kaj kartojn kaj vidkartojn el la kolekto de Stanisław Mandrak.
Ĝia malfermo okazos **la 28-an de marto (vendredo) je la 17-a horo** en la ekspozicia salono en Urba Publika Biblioteko en Gliwice ĉe la placo Inwalidów Wojennych 3 (100 m de Urboplaco).
**La organizantoj kore invitas !**




**La 28-an de marto 2008 jaro** en Urba Publika Biblioteko en Gliwice, ĉe la placo Inwalidów Wojennych estis malfermita ekspozicio **" Esperanto - akiraĵo de pola kulturo".** En la ekspozicio, oni prezentas esperantaĵojn el kolektoj de glivice'aj esperantistoj kaj precipe el kolekto de Stanisław Mandrak.
La ekspozicion malfermis direktorino de Biblioteko **Grażyna Lazar** kaj prezidanto de PEA-Filio Gliwice **Stanisław Mandrak.** Ili salutis ĉeestantojn kaj diris kelkajn vortojn pri ekspozicio.
La ekspozicio prezentas dokumentojn kaj memoraĵojn pri historio de Esperanto en Pollando kaj en la mondo. En ĝi estas ankaŭ memoraĵoj ligitaj kun kreinto de Esperanto Ludoviko Zamenhof kaj kun aliaj famaj polaj kaj mondaj esperantistoj. Interesa estas kolekto de koloraj vidkartoj kun esparantaj surskriboj. Oni povas vidi esperantajn malnovajn librojn kaj ankaŭ librojn eldonitajn en la lastaj jaroj. Estas prezentataj artikoloj el diversaj polaj ĵurnaloj en kiuj estas informoj pri Esperanto.
La ekspozicio estas bone aranĝita en granda salono, ĉiuj ekspoziciaĵoj estas en vitrinoj kaj estas bone videblaj.
**Ni, glivice'aj esperantistoj tre dankas al Urba Publika Biblioteko** pro la aranĝo de la ekspozicio kaj pro la popularigo de Esperanto.

La ekspozicio daŭros ĝis la fino de aprilo. Ni invitas ĉiujn, precipe la lernatojn de glivice'aj lernejoj, ĉar ĝi estas bona leciono pri pola historio kaj kulturo.

Jen kelkaj fotoj de la ekspozicio













# Vizito de ukrainanoj en Gliwice

**La 29-an de marto 2008** revenante el Germanio venis al nia urbo 6-persona grupo de ukrainaj esperantistoj, gvidata per samideano Mikaelo Lineckij. Dum nur unutaga vizito la gastoj promenis tra la malnova urbo vidante urboplacon, glivice'an kastelon, defendajn murojn kaj vizitis katedralon, kie oni ludis per orgenoj. Poste ili venis al urba biblioteko por rigardi ekspozicion pri esperanto. La ekspozicio bonimpresis ilin.
Sekve la gastoj vizitis la glivice'an palmejon kaj radiostacion-faman pro nazia provoko kiu komencis la duan mondmiliton.
Kompreneble restis iom da tempo por babilado.
En sekvonta tago matene la grupo forveturis al sia patrujo per ukraina buslinio. Gastigantoj estis mirigitaj pro malmultekostaj biletoj al Kijevo. Eble tia informo kaŭzos pli oftaj kontaktoj inter niaj esperantaj grupoj.




# Hungaraj esperantistoj gastis en Gliwice

**En la tagoj 13-16 de aprilo** inter glivice'aj esperantistoj gastis esperantistoj el hugara regiono Nyiregyhaza.
Al Gliwice venis konata en Hugario esperantistino, estraranino de HEA, s-ino Eniko ZENGO kun edzo kaj s-ro Gyozo Gaal (nomata Victor).

Gastoj tre interesiĝis pri nia urbo kaj regiono. Renkontiĝis kun la anoj de nia e-grupo. Vizitis lokajn vidindaĵojn: urboplacon, radiostacion, trapasis e-stratojn. Vizitis funkciantan e-ekspozicion en la urba biblioteko.
Krom nia regiono gastoj estis en Ĉenstoĥovo kie kliniĝis antaŭ Nigra Madono (edzo de Eniko estas greko-katolika pastro), rigardis helamontan muzeon, rigardis klostron. En Wadowice vizitis bazilikon kaj papan muzeon, manĝis "papajn kremaĵojn".
Krom kun glivicaj esperantistoj niaj "nevoj" renkontiĝis kun esperantistoj el Bielsko.
Niaj gastoj promesis reveni al Gliwice denove.











## Renkontiĝo en nia klubejo




## Pola esperanta televido




**La 2-an de majo 2008 jaro** startis reta pola esperanta televido farita per Bjalistoko. La televido estas rigardebla per retadreso:
www.itvc.pl. Sufiĉas klaki esperantan flagon.

## Malferma kurso de Esperanto

**Lunde je la 18-a horo** en sidejo de nia klubo estas malferma, senpaga kurso de Esperanto por komencantoj. **Ni invitas ĉiujn, kiuj volas komenci aventuron kun Esperanto.**

La kursantoj partoprenis la prelegon gvidatan de Gerhard Hirschmann el Germanio



# Por lernado de Esperanto neniam estas malfrue!



Prezidanto de nia filio **Stanisław Mandrak** gvidas kurson de Esperanto por studentoj de Universitato de Tria Aĝo en Kędzierzyn-Koźle. Li instruas laŭ la lernolibro de slovaka esperantisto Stano Marĉek "Esperanto per rekta metodo". Studentoj krom de larnado de la lingvo, ekkonas ankaŭ ĝian ideon. Ĉiuj volonte partoprenas la kurson kaj diligente lernas Esperanton.

La kurson vizitis konata esperantisto el Germanio Gerhard Hirschmann





Kursantoj kun Gerhard Hirschmann



# Printempa Renkonto de Esperantistoj


En Pelplin en la tagoj **23-25 de majo** okazis jam 8-an fojon Printempa Renkonto de Esperantistoj.
Inter kelkdeko da esperantistoj estis ankaŭ anoj de nia, glivice'a grupo.
Partoprenantoj krom diversaj interesaj renkontoj povis ĝui la muzikon (ne nur klasikan) plenumitan de simfonia orkestro de junaj pelplinaj muzikistoj, rigardis interesan prezentadon de folklora grupo "Modraki" kaj partoprenis la esperantan sanktan meson. Organizantoj kiel ĉiam krom abunda, bongusta manaĝdo regalis partoprenantojn per "esperanta torto".










Rapida trajno "Narew", kiu iras el Bjalistoko al Bielsko-Biała ŝanĝis sian nomon. Ekde la 1-a de junio 2008 j. ĝi nomiĝas **"Zamenhof".**
**La 1-an de junio** sur la peronoj de stacidomoj: Bjalistoko, Varsovio, Sosnowiec, Katowice kaj Bielsko-Biała esperantistoj salutis ĝin.
**Glivice'aj esperantistoj** kun aliaj sileziaj esperantistoj atendis la trajnon sur la kajo en Katowice. La trajno alvenis je la 13.40 horo. Sur la lokomotivo estis la

esperanta flago. En la unua vagono veturis Ludoviko Zamenhof kun sia edzino Klara. La trajno staris en Katowice nur 5 minutojn. La geedzoj Zamenhof elvagoniĝis, ĉiuj varme salutis ilin, Klara ricevis florojn. Poste ili denove envagoniĝis kaj esperantistoj adiaŭis la trajnon per la kanto "Vivu la verda stel".



La esperantistoj atendas la trajnon sur la kajo.


Ludoviko Zamenhof kun sia edzino Klara


Foto kun gesinjoroj Zamenhof sur la kajo.


La esperantistoj adiaŭas la trajnon.

## Fino de la Kurso

**La 6-an de junio 2008 jaro** en Kędzierzyn Koźle finiĝis la kurso de esperanto en kiu partoprenis la anoj de la Universitato de la 3a Aĝo.
Ĉiuj personoj ricevis la atestilojn. Kursigvidanto ricevis belan rozon kaj manfaritan karton kun verda stelo kaj kvarfolia trifolio. Oni komune trinkis la kafon kun kuko. Post la kantado partprenantoj faris komunan foton. Estis tre agrabla tago.







# Kunveno sur Czantorio

**La 15-an de junio 2008 j.** okazis ĉiujara, tradicia kunveno de ĉeĥaj, polaj kaj slovakaj esperantistoj en la montaro Beskidy, sur la monto Ĉantorio. La kunvenoj jam okazadas de ĉirkaŭ 75 jaroj.
La nunjaran renkontiĝon partoprenis 40 personoj, interalie esperantistoj el Gliwice. La aranĝon oficiale malfermis de ĉeĥa flanko Jaroslaw Suchanek, de pola - Aleksander Zdechlik kaj de slovaka - Jaroj Gondzur. La unuan fojon ĉiuj partoprenatoj ricevis identigilojn. Sur la fenestro de kabano troviĝis trilingvaj afiŝoj pri la aranĝo.Tiu agado kaŭzis intereson de turistoj-neesperantistoj, kiuj

demandis pri internacia lingvo.
Sur la Ĉantorio ĉiuj babilis kaj bone amuziĝis trinkante bieron kaj aliajn trinkaĵojn.
La partoprentoj ricevis senpagan tagmanĝon donacitan de sinjoro Marian Bronowicki el Skoczów. Dankon al li.











# Tre grava evento !

**La pola Sejmo, la pola parlamento proklamis unuanime per 397 deputitaj voĉoj rezolucion, proponitan de la sejma komisiono por la kulturo, kiu omaĝas la 100-jariĝon de la Universala Esperanto-Asocio.**

En la proklamita dokumento ni legas:

"La Sejmo de la Pola Respubliko en la 100-a datreveno de la kreiĝo de Universala Esperanto Asocio esprimas rekonvortojn al la daŭrigantoj de la verko de d-ro Ludoviko Zamenhof, kiu kreante la lingvon Esperanto deziris certigi al ĉiuj homoj la eblecon de reciproka kompreno kaj interkompreniĝo sendepende de la nacieco, raso, religio kaj mondkoncepto.
Esperanto ligas homojn en riĉa kaj varia kulturo, kies fundamenta mesaĝo estas internacia amikeco kaj universala paco.
La Sejmo de la Pola Respubliko dezirante omaĝi la kontribuon de doktoro Ludoviko Zamenhof al la monda civilizacia heredaĵo, subtenas la klopodojn de internaciaj medioj, ke la Universala Esperanto Asocio estu honorita per la paca Nobel-premio."

# Jubilea Ĉebalta Esperantista Printempo

Jam 30-foje renkontiĝis esperantistoj en Mielno, ĉe Balta Maro por kune travivi dekkelkajn neforgeseblajn tagojn. Ĉijare meze de junio al Mielno venis preskaŭ 70 personoj el 10 landoj. Multe el partoprenantoj estis en Mielno jam kelkfoje. En la aranĝo partoprenis ankaŭ esperantistoj el Gliwice.
Krom diversaj prelegoj pri muziko, germana e-agado, kursoj de esperanto, partoprenantoj vizitis la teŭtonan kastelon en Bytów, belegajn ĝardenojn en Dobrzyca kaj urbon Koszalin kaj ĝiajn ĉirkaŭaĵojn.
Antaŭtagmeze ĉiuj volis kaptadi la sunajn momentojn por sunbruniĝi.
Oni devas mencii, ke ĉeforganizanto de la aranĝo - Czesław Baranowski estis honorigita per Ora Honora Medalo de Popolaj Sportaj Organizaĵoj en PL pro multjara kunlaboro inter esperantistoj el Koszalin kaj PSO.
Neforgeseblajn kaj tre ŝatataj estis komunaj kantoj sub la gvido de Urszula Giercarz.
La lasta nokto ĉe bivakfajro finis tro rapide pasintajn tagojn en Mielno.












# IRIS 2

**En hungara urbo Szolnok, en julio okazis IRIS-2.**
Post la sukcesa pasintjara aranĝo al Hungario venis ĉijare reprezentantoj de kelkaj eŭropaj landoj. Venis ankaŭ 3-persona grupo el nia urbo.
IRIS-anoj povis partopreni en diversaj programeroj. Estis organizitaj diversaj prelegoj, rakontoj, kursoj. Infanoj havis specialan programon kun manlaboraĵoj.
Oni povis partopreni eŭropan junularan festivalon en la urbo Kecskemet. En ĉi festivalo partoprenis junulara grupo el urbo Okocim. Ĉiuvespere krom diversaj lud-programeroj oni povis kanti en karaokeo.
Organizantoj invitas al IRIS-3 venontjare al apudbudapeŝta urbeto Tata.



IRIS 2008



Stanisław Mandrak kun organizantoj


Gajaj patoprenantoj


Antaŭ la urbodomo



Parto de IRISanoj


Post la kurso

# 31 - a Tutpollanda Esperanto-Kongreso

**21-24.08.2008** okazis en Lodzo Tutpollanda Esperanto-Kongreso. Partoprenis multaj esperantistoj el tuta Pollando kaj kelkaj eksterlandanoj. En Lodzo estis ankaŭ anoj de nia glivice'a klubo.
La programo de la kongreso estis tre riĉa kaj interesa. Dum la solena malfermo kantis esperanta koruso "Eĥo" kaj honoraj gastoj diris salutvortojn. Ĉiujn varme salutis prezidantino de PEA Halina Komar.
Dum la tuta aranĝo okazis multaj prelegoj, interalie pri edukado, pri historio de Esperanto-Movado en Lodzo, pri organizado de UK 2009 ktp. Vespere oni povis partopreni la diversajn artajn programojn. Sabate okazis konsido de PEA deligitoj.
Dum la Kongreso ni havis okazon ekkoni la interesan urbon Lodzon. Ni vizitis judan tombejon, "Vilaon de E.Herbst", fabrik-loĝejan komplekson "Księży Młyn", ortodoksan preĝejon, palacon de Poznański kaj Manufakturan. Ni metis la florojn ĉe memortabulo al L. Zamenhof kiu troviĝas sur la muro de domo ĉe la strato Zamenhof.
Ni, glivice'aj esperantistoj tre dankas al esperantistoj el Lodzo pro la tre bona aranĝo.

Jen kelkaj fotoj de la Kongreso



Koncerto de koruso "Eĥo"


Vizitado de juda tombejo


Foto kun Julian Tuwim


Foto ĉe memortabulo al L. Zamenhof



Vizitado de Manufaktura




Esperanta stando en Manufaktura




Komuna foto antaŭ la kongresejo

## G R U P E – 12

GLIVICE'A RENDEVUO de UZANTOJ kaj PRAKTIKANTOJ de ESPERANTO

**Kelkvorte pri aranĝo:**




Kiel en pasintaj jaroj en Gliwice ni planas organizi aranĝon **GRUPE-12.** Ĝi okazos de sabato la 8-an ĝis mardo la 11-an de novembro en la sama loko kiel dum pasintaj jaroj: *Gliwice, str. Jagiellońska 21.*
La 11-an ni festos en Pollando 90-an datrevenon de nia sendependeco (11.11.1918).
Ni, kiel ĉiam invitas Vin partopreni nian rendevuon.

En la programo ni antaŭvidas: prelegojn, teatraĵojn, komunan kantadon, loterion kun interesaj premioj, vizitadon en karbominejo (Zabrze) kaj aliaj interesaĵeroj.

Vi ankaŭ povas kontribui al la programo. Venu kaj amuziĝu kun ni.

GRUPE 2008

**GRUPE 2008** daŭris ekde la 8-a ĝis la 11-a de novembro 2008 jaro. En ĝi partoprenis ĉirkaŭ 80 esperantistoj el tuta Pollando. Estis ankaŭ gastoj el Ĉeĥio, Slovakio, Bulgario kaj Ukrainio.
Kiel en pasintaj jaroj ni partoprenis en multaj prelegoj kaj aliaj programoj.
Okazis ankaŭ du eksursoj: al karbominejo "Reĝino Luiza" en Zabrze kaj al fama radiostacio en Gliwice.

**Dum la aranĝo prelegis:**

Alicja Lewanderska - "Akademio de Sciencoj San Marino"
Michail Lineckij (Ukrainio) - "Ludoj dum instruado de esperanto" kaj "Esperanto kaj komerco"
Stanisław Mandrak - "Historio de Esperanto per filatelio"
Ewa Caban - "Lignaj preĝejoj en silezia vojevodio"
Roman Dobrzyński - "Bona Espero - idealo kaj realo" -nova libro
prof. Bozidar Leonov (Bulgario) - "Esperanto en Bulgario. Kio estas TOLE?"
Halina Komar - prezidantino de PEA - "Unu kontraŭ ĉiuj - pola esperantujo"

**Okazis ankaŭ :**

Spektaklo de Jadwiga Gibczyńska - " Ĉu nepoj nin benos?"
"Momento kun poezio" - Lidia Ligęza, Waldemar Lipowicz
"Leviĝanta Bjalistoko" - filmo pri venontjara kongres-urbo de UEA
Komuna amuzado kaj kantado kun Michailo Lineckij (Ukrainio)
Esperanta loterio
Ni esperas, ke ĉiuj partoprenantoj bone amuziĝis dum la randevuo kaj venontjare denove vizitos nin.










**La 17-an de decembro 2008** en Urba Publika Biblioteko en Stalowa Wola okazis kunveno kun prezidanto de nia filio Stanisław Mandrak. Li organizis tie la ekspozicion de esperantaĵojn el kolektoj de glivice'aj esperantistoj kaj precipe el lia propra kolekto. Li ankaŭ prelegis pri Esperanto kaj pri ĝia kreinto.

## Niaj kunvenoj en la klubejo











